

Christian Morgenstern,
La du radikoj

tradukita de Richard Schulz

Najbara kaj abiradika paro
konversacias en arbaro.
La pintoj supre multon ja susuras.
Ĉi-sube la radikoj nur murmuras.
Sciur' maljuna sidas en proksimo,
kulturas sian pacon en animo.
L'unua diras: knig', la dua: knago.
Sufiĉas tio ĉi por unu tago.

*Traduko de la Germana poemo "Die zwei Wurzeln" de CHRISTIAN MORGENSTERN (Kristiano Matenstelo, *1871-05-06 – †1914-03-31) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (Rikardo Ŝulco, *1906-07-12 – †1997-09-26) en 1980.*

Arg-75-984 (2013-02-26 15:12:28)

Mi, Manfred Retzlaff, publikigas tiun ĉi tradukon de la poemo kun permeso de s-ano Hermano Bermano (Hermann Behrmann, Schevenstr. 12 B, D-01326 Dresden, Germanujo). Mi trovis la tradukon en la libro "Pendumilaj Lidoj laŭ Kristiano Morgensterno", eldonejo Bleicher, 1980, ISBN 3-88350-501-3. Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz.